# Novjorka Prismo

Numero 99 Decembro 2000



*The Esperanto Society of New York invites you to its annual Zamenhofa Festo!*

WHEN: Friday, December 15, 2000, 6:30-9:00 pm



WHERE: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
Check schedule in lobby for room number



PROGRAM: Buffet dinner! Zamenhofajoj! Singing! Fun!
(Election of officers for the year 2001 at 7:30 pm)



MENU: Feel free to bring a main or side dish, dessert, or beverage to share. Please call Rochelle F. Grossman at 718-457-1490 to see what we need. ★

## Protokolo de la kunveno de la 17-a de novembro 2000

Je 7:07 ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon. Ĉeestis 18 personoj, inter ili membro de la komencanta klaso de Esperanto ĉe Stuyvesant Adult Education Center, kun sia edzino. Nia kunvenĉambro estis je la kvara etaĝo de 49 orienta 21-a strato, ĉirkaŭ la angulo de nia kutima kunvenejo.

Tomaso diskutis pri la politikaj aferoj. Ni faris plian voĉdonon por tiu, kiu oni opinias estos la gajnanto de la usona prezidenta elekto. Ok personoj voĉdonis por Gore, kvin personoj por Bush. Tuj poste, Alex KARKOVSKY eniris la ĉambron, kaj ni devis revoĉdoni. Tomaso reklarigis pri la problemo kun la reklamoj en la senpaga ĵurnalo *New York Press*.


Rochelle F. GROSSMAN fordonis kopion de la Jarlibro de UEA, kaj kuraĝigis personojn iĝi membroj de ELNA kaj de UEA. Pam LIEBER kunportis kopiojn de la ĵurnalo *Monato* por fordoni. Pam parolis pri la libro *Languages for War and Peace* de Mario PEI.

Arnold VICTOR estis la sola membro de la kandidatiga komitato kiu ĉeestis la ĉimonatan kunvenon. Li anoncis, ke la komitato ne jam trovis personon por esti programdirektoro por la venonta jaro.

Rochelle ĉirkaŭenpasigis liston por personoj, kiuj volas volontuli alporti manĝaĵojn al la Zamenhofa Festo venontmonate je la 15-a de decembro, kiu hazarde estas la vera naskiĝtago de Zamenhof.

Sonja SOSKINA montris demandaron, kiu inkluzivas demandojn tiaj, kiaj kiom da lingvoj oni posedas.

Tomaso anoncis, ke d-ro Julius MANSON lasis grandan kvanton da libroj en Esperanto al la klubo. Rochelle anoncis, ke oni povas havi Esperanto-pinglojn de la kolekto de d-ro MANSON senpage. Tomaso menciis, ke la klubo volas eldoni pli grandran ol kutime numeron de *Novjorka Prismo* en januaro 2001, kaj personoj, kiuj volas kontribui al tiu numero, devos fari ĝin venontmonate.



Je 7:36 ptm, la ĉeestantoj komencis rigardi la filmon *Incubus*, en kiu la aktoroj parolis nur en Esperanto. La fama aktoro William Shatner, kiam li estis juna viro, estis la ĉefa aktoro de la filmo. La aktoroj ne estis esperantistoj, do kompreneeble la prononco de la vortoj estis tre malproksime de perfekteco. Ili anstataŭigis kelkajn literojn per aliaj , inter ili: *'i'* anstataŭ *'j'*, *'a'* anstataŭ *'o'*, *'j'* anstataŭ *'ĝ'*, *'i'* anstataŭ *'e'*, kaj ceteraj. La vortluda ŝerco "Kia estas mia nomo?" estis tute perdita, ĉar en la filmo, la aktoroj misprononcis la nomon de unu el la virinaj karakteroj kiel *'Kaja'* anstataŭ *'Kia'*. Tiu-ĉi sciencfikcia filmo temas pri amo kaj pri konflikto inter la servantoj de 'La Dio de Lumo' kaj tiuj de 'La Dio de Mallumo'. Je la fino de la filmo, du el la karakteroj enamiĝis unu kun la alia.

La filmo finiĝis je 8:54 ptm per la vorto 'FINO' sur la ekrano. Tuj poste Tomaso fermis la kunvenon kaj kelkaj ĉeestantoj iris al la restoracio My Cousin Vinny's por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Sony Plaza

La 3-an de decembro pli malpli dek geesperantistoj renkontiĝis ĉe Sony Plaza por babili. Inter aliaj aferoj, ni diskutis pri kiel traduki "roly-poly" (angle) al pluraj lingvoj. Ankaŭ Susan Kohn anoncis, ke ŝi pretas akcepti la postenon program-direktorino de nia klubo. ★

*– Tom ECCARDT*



*Societanoj dum la decembra tagmanĝo ĉe Sony Plaza.*

## Gratulon de ELNA!

Al redaktoro Jim Medrano, subredaktoroj Tom Eccardt kaj Nancee Medrano, kaj desegnisto Mary Pulley, mi salutas vin kaj vian grandan laboron!

Esperantistoj kaj siaj laboroj venas kaj foras. Dum kelkaj monatoj aŭ kelkaj jaroj, volontulo avide pritraktas ian aŭ alian temon; poste trovas alian, aŭ eĉ kabeas. Sed dum dek jaroj kaj preskaŭ nekredebla cent numeroj, vi senĉese daŭris vian valoran laboron.


Ĉiam estas plezuro, kiam *Novjorka Prismo* alvenas ĉe mia hejmo. Ĝi, kaj vi, estas indaj ekzemploj al esperantistoj ĉie. Mi gratulas vin kaj dankas vin, kaj esperas, ke vi longe daŭros plu. ★

*Sincere, David WOLFF*
*Prezidanto, ELNA*
*dwolff@world.std.com*
*"Nia celo estas *ŝanĝi la mondon*."*

## Novaj esperantistoj

La komencanta kurso de Esperanto ĉe Stuyvesant Adult Education Center finiĝis ĉimonate. Du studantoj, Richard DINNEN kaj Randell BARCLAY *[vidu la foton ĉi-sube]*, finis la kurson kaj dum la lasta klaso ricevis diplomon de la instruisto, Tomaso Eccardt. Nova semestro komenciĝos en februaro. ★

*– Jim MEDRANO*



## Toastmasters

Alex Karkovsky informis min, ke li estas parolonta pri Esperanto ĉe la Toastmaster's club je lundo, la 4-a de decembro, je la 6-a horo ptm, ĉe 27 West 27th Street. Ni ĉiuj estis invitataj veni por kuraĝigi lin. ★

*– Tomaso ECCARDT*

**DUES ARE DUE for the year 2001**
**Ĉu vi jam pagis vian kotizon?**

## Ĉe UN



La 26-an de oktobro mi partoprenis duhoran kunvenon de Neregistaraj Organizaĵoj (NRO) en la UN-konstruaĵo en Novjorko. La temo estis la Jaro de Dialogo inter Civilizacioj. Temis pri unu el tiuj "inform-kunvenoj" dum kiuj NRO-oj kiel UEA k.a. estas oficiale informataj pri UN-aferoj flanke de UN-oficialuloj.

Ĉi-foje Giandomenico Picco, la respondeculo pri la Jaro de Dialogo (2001), kaj ankaŭ la direktoro de la Unesko-oficejo en Novjorko, Alfatih Hamad, ĉeestis.

Picco, kiu ĉef-respondecas pri la Jaro de Dialogo inter Civilizacioj, tre klare informis kiel li komprenas la sencon de la vorto "dialogo" – kaj mi pensas, ke tio povas esti tre interesa por ni esperantistoj: li diris, ke temas nek pri dialogo inter religioj, nek pri dialogo inter historie grandaj civilizacioj, nek pri dialogo inter la Islama mondo kaj la okcidento (kion kelkaj sugestis), sed nur pri unu dialogo: inter tiuj, kiuj vidas diversecon kiel minacon, kaj tiuj, kiuj vidas diversecon kiel ŝancon. Li diris, ke la celo de la Jaro devas esti diskuto pri la demando: Kiel ni povas mastrumi diversecon pli bone? Tio inkludas ĉefe edukadon sur ĉiuj niveloj.

Picco ankaŭ klare diris, plurfoje kaj tre insiste, ke li ne planas okazigi iun ajn "akademian" diskuton, teorian diskuton pri sencoj, direktoj, sciencaj aliroj ktp. Li ĉefe volas praktikumi, t.e. instigi grupojn da homoj de ĉiuj edukaj niveloj tra la mondo praktike, vere diskuti (ĉefe Interrete) pri siaj inter-kulturaj spertoj, kaj persone renkonti unu la alian.

Mi metis informfolion pri UEA kaj ties opinio kaj celo en tiu ĉi kunteksto sur la dokumentan tablon antaŭ la enirejo, kaj la cent folioj estis elĉerpitaj praktike tuj.

Mi pensas – kaj kun mi kelkaj oficialuloj de UEA – ke ni povus bone kontribui (kaj profiti) de la UN-Jaro de Dialogo inter la Civilizacioj. Niaj internaciaj renkontiĝoj ja estas laŭnature renkontejoj de homoj de diversaj kulturoj, okazadas tie diskutoj ktp. Ni devus nur sendi al UEA kiel eble plej multajn raportojn pri niaj multaj, multegaj inter-kulturaj kaj inter-civilizaciaj renkontiĝoj ĉie en la mondo, kaj enplekti en tiujn raportojn la lingvan flankon kaj skribi kial tiu nia solvo helpis la inter-kulturan dialogon.

Se tiuj raportoj venus el la tuta mondo al UEA, kiu kolektus ilin – selektus tiujn, kiuj taŭgas, kun la fokuso al kelkaj grandaj (UK ktp.) kaj aldonante variecon de malgrandaj – kaj en la dua duono de 2001 sendus ilin kun komento al Picco kaj lia oficejo, ni certe ne nur bone kontribuus sed ankaŭ estus menciotaj en la oficiala raporto de la Jaro de Dialogo inter la Civilizacioj, kiel unu el la plej aktive kontribuantaj NRO-oj.

Mi mem preparos Interretan paĝon (lanĉotan en januaro 2001), en kiun esperantistoj povos sendi siajn raportojn, kaj kie ili povas legi la spertojn de aliaj. ★

*– Ulrich BECKER*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Decembro** — **15**

**ZAMENHOFA FESTO**
*Buffet dinner; elections*
*Friday, 6:30 pm at UFT*

**Januaro 2001** — **1.1.1**

**Limdato por kontribuajoj por** ***Novjorka Prismo*** **numero 100**

**7**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe SONY Plaza*

**19**

**ESNY KUNVENO**
*Vendredo, 6:30 ptm ĉe UFT*

United Federation of Teachers (UFT)
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

SONY Plaza Atrium
Madison Avenue (55th/56th Streets) NYC
Street level, in the Atrium



*Feliĉan Novjaron!*
***2001***


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041

| Prezidanto | Koresponda Sekretariino | Protokolisto |
|---|---|---|
| Thomas Eccardt | Rochelle F. Grossman | Stuart Green |
| (212) 477-6516 | (718) 457-1490 | (631) 751-5683 |
| **Vicprezidanto** | **Kasistino** | **Program-Direktoro** |
| Arnold Victor | Sofiya Soskina | Alex Karkovsky |
| (212) 645-3794 | (718) 671-5699 | (718) 769-7235 |



**Novjorka Prismo**
Numero 99 – Decembro 2000
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

| Redaktoro | Subredaktoroj | Desegnistino |
|---|---|---|
| Jim Medrano | Thomas Eccardt | Mary Pulley |
| (212) 982-5029 | Nancee Medrano | |

Sendu kontribuajojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com



© 2000 Esperanto Society of New York